

LETERO DE J. VÍTEK AL G. HUSÁK

La prezidanto de Ĉeĥa Esperanto-Asocio Josef Vítek sendis la 4-an de junio al k-do d-ro Gustáv Husák, novelektita ĝenerala sekretario de CK KPC leteron, kiu tekstas :

Estimata kamarado ĝenerala sekretario,

permesu al mi en la nomo de ĉeĥaj esperantistoj gratuli Vin okaze de Via reelektado en la gvidan partian funkcion. Mi ŝatus esprimi mian sinceran konvinkon, ke Komunista Partio de Ĉeĥoslovakio atingos sub Via gvido pluajn gravajn sukcesojn sur la vojo, kiun iras nia socialisma socio al la venonta komunisma socio.

Permesu, ke mi samtempe informu Vin, ke la estraro de Ĉeĥa Esperanto-Asocio pritraktis ĉe sia kunsido la 3an de junio 1971 konkludojn de la XIV-a Kongreso de KPC, kun kiu ĝi plene kaj senrezerve identigas kaj pretas plenumadi ilin. Ankaŭ en sia plua agado la ĉeĥaj esperantistoj sekvas la principojn de la komunisma klasa politiko. La Esperanto-movado per tuta sia esenco celas al disvolvado de pacaj rilatoj inter diversnaciaj laboruloj. La ĉeĥaj esperantistoj daŭrigos sian laboron laŭ progresemaj tradicioj de Laborista Esperanto-Asocio kaj aliĝas al ties koncepto pri la universala lingvo kiel ilo de la klasbatalo, sekve al la koncepto kon-

sekvence leninisma.

Akceptu do, estimata kamarado sekretario, ankoraŭfoje sinceran gratulon pro Via elekto.

Responde al tiu ĉi letero ricevis J. Vítek la 6. ĉ. slovake presitan dankesprimon kun propra mana subskribo de d-ro G. Husák :

Mi dankas pro la salutoj kaj bondeziroj okaze de la elekto en la funkcion de la ĝenerala sekretario de CK KPC.

Kvardek landoj en Londono



Pli ol 2000 kongresanoj el 40 landoj kolektiĝis la 3an de julio en grandega halo de Royal Festival Hall por la inauguro de la 56-a Universala Kongreso de Esperanto. Prof. d-ro Ivo Lapenna, la prezidanto de UEA malfermis la kongreson, salutante unuavice registarajn reprezentantojn kaj dankante al la Lordurbestro de la antikva civito Londono - alta protektanto de la 56-a UK, Kavaliro Peter Studd, kiu estis malhelpita persone partopreni la inauguron kaj kies leteron tralegis en E-traduko la prezidanto de UEA.

La prezidanto de la IKK informis, ke aliĝis al la Kongreso 2065 kongresanoj. Sekvis salutoj de reprezentantoj de 14 registaroj, inter ili tiuj de Bulgario, Hungario kaj Pollando. Al ili dankis I. Lapenna, substrekante, ke neniu salutis (Daŭrigo sur la 3-a pg.)

Brno festis la jubileo

Solenaĵojn okaze de la 70-jara jubileo de EK Brno /11.- 13.6./ okazigis komune ambaŭ Esperanto-societoj en Brno /EK ĉe PKO kaj ER ĉe l.B./ Dum la solena kunsido la 12an de junio reprezentantoj de la kultur-organizaĵo PKO kaj de ties EK aranĝis laŭmeritan honorigon al Josef Vondroušek, prezidanto de EK-PKO kaj al A. Růžičková pro ilia kontribuo al la kultura vivo de la urbo.

La kunsidon sekvis koncerta matineo sub la gvido de prof. Vilibald Scheiber. Profesiaj gekantistoj H. Halířová, N. Dronská kaj R. Chudoba el Brno kaj M. Smyčka el Ústí n.L. altnivele prezentis muzikajn erojn en Esperanto. La artan programon kompletigas vendreda vespero en la poezi-vinejo "Múza" kun la ĉefrolanto A. Růžičková, aktorino de la Teatro de fratoj Mrštík.

Sabata posttagmezo kaj dimanĉa antaŭtagmezo estis dediĉitaj al la plej grava parto de la solenaĵoj - Konferenco pri la historio de la Esperanto-movado sur la teritorio de Ĉeĥoslovakio. Oni aŭskultis prelegojn fare de J. Cink, V. Echtner /legis V. Novobilský/, J. Mařík, ing. F. Sviták, E. V. Tvarožek kaj d-ro V. Novobilský CSc. En ĉiuj aranĝoj partoprenis ĉirkaŭ 160 personoj.

La Ĉeĥa Radio en Brno elsendis 11.6 25-minutan prelegon de Josef Vondroušek pri Esperanto ĝenerale kaj pri la jubileo speciale kaj intervjuo kun la sama aperis en "Svobodné slovo". Pri la evento raportis pluaj gazetoj en Brno kaj aliloke. /Jer/

Ze života kroužků

BUČOVICE - EK ve spolupráci se zdejší výtvarným kroužkem Lidové školy umění odeslal 15 dětských kreseb na mezinárodní výstavu do francouzského Avignonu.

Začátkem června navštívili Bučovice francouzští esperantisté Jacqueline a Lucien Uzé z Paříže.

PODĚBRADY - Také letos uspořádal EK tradiční, již jedenácté přátelské setkání (3.- 4.7.) za účasti asi 60 esperantistů. ČES zastupoval jeho předseda Josef Vitek.

VSETÍN - Předsednictvo kroužku pro jednává na pravidelných schůzích organizaci zářijového setkání. Přihlášek na setkání zatím není mnoho - pouze 72 z dvaceti měst. Hlásí se zájemci z Maďarska, Polska, Bulharska a NDR.

Představení Manon Lescaut se konat nebude, protože esperantská skupina divadla Z. Nejedlého v Opavě se rozešla.

V rámci setkání se uskuteční pracovní schůzka lékařů-esperantistů ČES. Na programu je mj. projednání organizačního řádu sekce.

DŮLEŽITÉ UPOZORNĚNÍ ČES

Český esperantský svaz je jediným oficiálním představitelem esperantského hnutí v ČSR. Nikdo jiný, zejména ne soukromé osoby, nemůže české esperantské hnutí zastupovat před organizacemi doma či v zahraničí. Jedině ČES je oprávněn, vedle státních organizací, zprostředkovávat také hromadnou výměnu esperantských publikací a dalších materiálů se zahraničními esperantskými organizacemi a jednotlivci. Soukromé osoby nejsou oprávněny provádět tuto distribuci ve větším rozsahu.

Pokud jde o distribuci a zastupování zahraničních esperantských časopisů v ČSR, vyhrazuje si ČES jmenovitě tyto zástupce schvalovat. Svaz proto žádá všechny zprostředkovatele (perantoj) a další osoby, které tyto časopisy zastupují a šíří v tuzemsku, aby se nejspózněji do 25. září tr. přihlásili sekretariátu svazu, který vypracuje příslušnou evidenci.

ĈION KONCERNE LA GAZETON AŬ TIES RE-
DAKTORON DIREKTU AL : STARTO, ĈEĤA ES-
PERANTO-ASOCIO, PRAHA 2, P.K. 8, ĈSR.

DANKESPRIMON pro la gratulo okaze de la reelekto en la ŝtatestran funkcion sendis al la prezidanto de Ĉeĥa Esperanto-Asocio Josef Vitek la aŭstria prezidento Franz Jonas.

Revoluciaj tradicioj de la Esperanto-movado en ĈSSR

Kiel laboris progresemaĵ esperantistoj en la norda Moravio inter la du mond-militoj? Je tiu ĉi demando respondis interesa ekspozicio aranĝita en junio de Esperanto-fako de la Kulturdomo VŽKG (Ferfabrikoj de K.Gottwald) en Ostrava-Vitkovice.

Dank'al la iniciato de la tieaj membroj oni sukcesis kolekti konsiderindan aron da dokumentoj, inter ili ankaŭ la gazeton "Proleta Esperantisto", kiun eldonadis Laborista Esperanto-Societo en Ostrava. Unu el la celoj de tiu ĉi societo estis vastigi marks-leninismajn ideojn helpe de la internacia lingvo. La societanoj kontaktis kun progresemaĵ Esperanto-organizaĵoj tra la tuta mondo. Pri tio atestas cetere centoj da dokumentoj, kiujn oni povis vidi en la ekspozicio.

La starpunkto de la tiamaĵ aŭtoritatoj al la laboristaj esperantistoj klare evidentiĝas en la decido de la polica direkcio en Moravská Ostrava, la 25-an de oktobro 1933, per kiu oni likvidis la agadon de la societo, ĉar estis pruvite, ke "ĝi servis al la celoj de la disigita Komunista Partio de Ĉeĥoslovakio, sekcio de Komunista Internacio kaj inter la elstaraj funkciuloj de la societo estas, eventuale estis, gvidaj aktivuloj de tiu ĉi partio."

Alia parto de la ekspozicio resumis atingojn de la internacia lingvo en la porpaca batalado. Elmontritaĵ estis tie kontraŭfaŝismaj gazetoj en Esperanto kiel "Popola Fronto" aŭ "Ruĝa Esperantisto". Interesa estas letero el 1936 rilate kunlaboron kun la "Komitato de helpo al elmigrintoj el Germanio".

Pri amikaj rilatoj inter la ĉeĥaj kaj sovetiaĵ esperantistoj konvinke parolas serio da leteroj, kies aŭtoro, s-ano Josef Sendzimír, funkciulo el Ostrava, intencis elmigri Sovetion. Tamen lia plano fiaskis post la nazia okupado. La faŝistoj malliberigis lin en koncentrejo, kie li pereis.

Domage nur, ke la plejparto de la materialoj pri la agado de la laborista esperantistaro estis neniigita dum la milito.

Ĉeĥoslovakaj esperantistoj estas heredintoj de la revoluciaĵ kaj humanismaj tradicioj de Laborista Esperanto-Societo, kiu montras al ili direkton de la plua klopodado.

D.K.

A t e n t u ! Kopioj de la dokumentoj ekspoziciitaj en Vitkovice estas je dispono al ĉiuj rondetoj. Formato havebla : maksimume A 4 !

KVARDEK LANDOJ EN LONDONO

(Daŭrigo de la 1-a pago)

en angla lingvo, sed en sia lingvo aŭ en Esperanto.

Poste sekvis salutoj de Landaj Asocioj aliĝintaj al UEA, inter ili ankaŭ tiu de Josef V í t e k, la prezidanto de ĈEA, kiu diris i.a. : "Ofte oni parolas pri nia lando kiel pri la koro de Eŭropo kaj la koro estas ĉiam simbolo de bona kaj de bona volo. Permesu al mi ankaŭ vin ĉiujn certigi, ke ni - ĉeĥaj esperantistoj - volas firme helpi ĉiujn ideojn kaj agojn, kiuj gvidas la homaron al pli paca estonteco."

Sekvis salutoj de landaj asocioj ne aliĝintaj al UEA : GDR, Islando, Rumanio kaj Slovaka SR (s-ro P. Rosa) kaj landoj sen organizita movado : UAR kaj Portugalio.

Post la muzika punkto prezentis sian

festparoladon prof. d-ro Ivo Lapenna. (Esencan parton de lia parolado ni alportos en la venonta numero.)

Vespere la saman tagon ĉiuj kongresanoj denove plenigis la Regan festivalan halon por ĝui la varian programon de la Brita vespero.

S T A R T O - eldonas Ĉeĥa Esperanto-Asocio - vydává Český esperantský svaz, p.schr. 8, Praha 2. Aperas dufoje kvaronjare - vychází dvakrát čtvrtletně. Respondeca redaktoro - odpovědný redaktor Oldřich Kníchal. Redakta komitato - redakční rada : ing. Eduard Felix, Jaroslav Mařík, ing. František Sviták. Dohlédací pošta Praha 07, snižený poštovní poplatek povolen RP Praha j.zn.P/1-2283/1971 dne 6.5.1971.

Samideana kroniko

MORTIS MARTIN BENKA. La 28an de junio mortis en Malacky (okcidenta Slovakio) aĝa 83 jarojn la Nacia Artisto, akademia pentristo M. Benka, unu el la fondintoj de la moderna slovaka pentroarto. Benka per sia arta kreado starigis monumenton al la slovakaj pejzago kaj popolo. Kun esperantistoj li ŝate kontaktis kaj verkis en Esperanto kelkajn rakontojn. Al AE SSR kondolencis en la nomo de ĈEA J. Vitek.

Sian naŭdekan naskiĝtagon festis la 9an de agosto s-ro JUDr Josef F o u s e k en Přelouč, honora membro de ĈEA esperantisto de post 1907, konata E-tradukisto de la muziktekstoj.

S-ro Ota G i n r, honora membro de EK Praha, sepdekkvinjarigis la 19-an de julio.

Aĝon de 75 jaroj atingis la 25an de junio ankaŭ s-ro inĝ. Ladislav D a n i e l, membro de EK Praha.

La 30an de julio pasis 15 jaroj de la morto de d-ro Stanislav K a m a r ý t. Florikronon sur lian tombon metis delegitaro de EK Praha.

Forpasis s-ro Jaroslav T u r e k el Plzeň, pensiulo, kaj Jan D o l e j š, delegito de UEA en Abertamy, distr. K. Vary. Honoron al ilia memoro!

Al s-ino D. Zdvihalová, prezidantino de JS ĈEA naskiĝis la 29an de junio filino R e g i n a.


JUNAJ ESPERANTISTOJ EN HERBORTICE

Preskaŭ okdek esperantistaj gejunuloj el ĉiuj anguloj de nia lando travivis belan libertempon inter 10.-24.7. en la somera tendaro en Herbortice apud Lanškroun. Ili invitis ankaŭ siajn korespondantojn el Pollando, Hungario kaj Nederlando. La plej juna ĉeestanto - denaska esperantisto - estis 4-jara filo de la tendarestro s-ro Šváček. La tendaranoj sukcesis venigi al komuna bivakfajro kelkcentojn da interesuloj el la ĉirkaŭaĵo. V. Sládeček

RENKONTIĜO EN KUNĚTICKÁ HORA

Sub la aŭspicio de la Kulturdomo de ROH Dukla-Pardubice okazis la 25-an de majo amika esperantista renkontiĝo en la ekskursloko Kunětická hora. Ĉeestis 85 esperantistoj. La plej multaj venis el Ĉ. Třebová, Svitavy kaj Kolín.

Pri lastatempaj aktivecoj de ĈEA informis la partoprenantojn reprezentantoj de la asocio P. Polnický kaj D. Kočvara. Variaj estis kultura kaj distra programoj, kies esencan parton prizorgis kant-kaj dangrupoj el Ĉ. Třebová kaj Pardubice. (La partoprenantojn vidu sur la fotografajo de M. Rybáček.)



Pli grandskale apliki la internacian lingvon

KOMUNIKAĴO PRI LA KONFERENCO DE SOCIALISMAJ ESPERANTO-ORGANIZAĴOJ EN BERLINO

Laŭ la invito de la Germana Kulturligo (GDR) okazis en Berlino de 25-a ĝis 29-a de marto 1971 konsulta Konferenco de reprezentantoj de Esperanto-organizaĵoj de europaj socialismaj landoj: Bulgara Popola Respubliko, Ĉeĥoslovaka Socialisma Respubliko, Germana Demokratia Respubliko, Hungara Popola Respubliko, Pola Popola Respubliko kaj Soveta Unio.

En la konferenco oni priparolis demandojn pri profundigo de la kunlaboro inter la Esperanto-organizaĵoj de la socialismaj landoj. Oni traktis ĉefe pli largan uzadon de la internacia lingvo Esperanto kiel taŭga instrumento ankau por la kontribuo al plia frata kumagado de siaj respektivaj popoloj en la politika, socia kaj kultura sferoj. La partoprenintoj diskutis la taskojn de la esperantistaro en la pacba-

KUBO EKUZOS ESPERANTON

Laŭ la sciigo de Internacia Gazetara Servo la registaro de Kubo anoncis, ke ĝi planas baldaŭ ekuzi la Internacian Lingvon Esperanto en iuj el siaj internaciaj komunikoj. Kubo intencas aperigadi "revolucion revuon" en Esperanto kaj eldoni tiulingvajn tradukojn de kvar gravaj libroj inkluzive de la "Bolivia Taglibro" de E. Guevara. Samtempe oni anoncis, ke en Kubo estos fondita "Internacia Socialisma Instituto de Esperanto."

UNUJ EKZAMENITOJ DE ĈEA

La ekzamena komisiono de ĈEA, kiu komencis labori en marto, organizis en aprilo 1971 en Kutná Hora la unuajn asociajn ekzamenojn. Tie gajnis diplomojn la unuaj sep kandidatoj:

Tomáš Antoš, Taras M. Bohun, Dr. Josef Hradil, Jaroslav Klement, Josef Roubínek, Ladislav Špina (diplomoj de la 2a grado) kaj Jiří Rada (diplomo de la unua grado).

Limdatoj por aliĝo estas: la lasta tago de februaro kaj la lasta tago de agosto. La datoj de personaj ekzamenoj estas aprilo aŭ majo, oktobro aŭ novembro.

talo lige kun kunlaborado de neesperantistaj pacmovadoj pri pli intensa uzo de la internacia lingvo - por objektiva prezento de siaj landoj al la ekstera mondo, en la intereso de interkompreniĝo de ĉiuj popoloj sen diferenco de ilia socia ordo.

Dum la kunsidoj estis prezentitaj referatoj pri sciencaj problemoj de la internacia planlingvo.

HORIZONTO DUAFOJE

Litovaj esperantistoj sukcesis prezenti al la internacia legantaro jam la duan kajeron (la unuan ni recenzis en la 1-a numero ĉj.) de HORIZONTO de SOVETA LITOVIO, denove kun varia kaj interesa enhavo. Ni menciuj almenau kelkajn titolojn: Lingvistikaj konceptoj de F. Engels, Riceco de Esperanto kompare kun naciaj lingvoj, Unuaj esperantistoj en Litovio, krom aro da beletraj kontribuajoj. Interesatoj pri la publikaĵo, turnu vin al: Societo de amikeco, Esperanto-sekcio, 232000, Vilnius, Kostiuškos 36, Litova SSR. (k)

SCIENCISTOJ SERĈAS KONTAKTOJN. En Wroclaw fondigis 23-membra Internacia Scienca Rondo de Esperantistoj (Wroclaw 17, p.k. 16, Pollando) kun la celo popularigi Esperanton inter studentoj kaj sciencistoj de la urbo kaj serĉi sciencajn kontaktojn inter altlernejtoj de diversaj landoj.

MONKOLEKTADO - POR KIU CELO ?

Dum la lastaj jaroj multaj organizaĵoj en nia lando helpis laŭ siaj eblecoj al la popoloj de Hindocinio aŭ al viktimoj de katastrofoj en evolulandoj. Jen la fakto, kiu devus pensigi ankau E-rondetojn, ĉar ili ofte kolektas monon ĉe diversaj okazoj - dancvespero, bankedo aŭ tombolo - ofte nur por distro.

Ĉu donaci tiamaniere kolektitan monon al suferantaj proksimuloj ne estus pli digna ago, adekvata al la homama celo de esperantismo? Estus nenature, se ĝuste esperantistoj ne emus tion fari. (knl)

SIGNALILO

Ze sekce
železničářů
Č E S



Výborová schůze SŽ ČES se koná 26. září v 9. hod. v Kulturním domě ve Vsetíně v rámci setkání esperantistů, na něž sekce zve všechny své členy.

Vedoucím zájezdové komise sekce byl zvolen na poslední členské schůzi s. Svoboda z Mostu. Členy komise jsou s. Fencel z Chomutova a ss. Helmečyová a Osoha z Prahy.

Za příspěvek 30 Kčs může člen sekce, pod podmínkou, že je i členem svazu, dostávat od příštího roku časopis mezinárodní organizace IFEF "Internacia Fervojisto".

24. KONGRES IFEF bude od 6. do 12. května 1972 v Luganu ve Švýcarsku. Zájemci nechtě se již nyní hlásit na adresu sekce. Jubilejní 25. kongres se sejde v dánském Aarhusu. Další, 26. kongres, hodlá SŽ uspořádat v Československu. Sekce již požádala prostřednictvím ČES o souhlas státních orgánů.

D ů l e ž i t é u p o z o r n ě n í ! Výroční členská schůze, na níž bude zvolen nový výbor, se má uskutečnit v Praze ve dnech 27.-28. 11. 1971. K účasti jsou pozváni zástupci sekcí ze sousedních zemí. Jednání budou probíhat v esperantu. /Zájemci o nocleh, napišete včas sekcí !/ Poslední členská schůze SŽ v Praze se zúčastnili dva hosté z NSR a jeden z Polska.

Z KROUŽKŮ - EK při ZK železničářů v Č. Třebové uspořádá od 1. do 10. října propagační výstavku. Materiály o činnosti esperantistů - železničářů zasílejte na adresu SŽ.

Č. Třebovou letos navštívili A. L. Ahlrén ze Švédska, H. Przetocká z Polska a F. Mawson z Anglie. Kroužek navázal družbu s esperantisty z Kladska /PLR/.

MOZAIKO DE LA 23-a KONGRESO DE I F E F EN MARIBOR

La kongreson, kiu okazis inter 15.-21.5.1971, partoprenis 710 samideanoj el 20 landoj. • La loka vesperjurnalo "Večer" raportis ĉiutage pri Esperanto. La fervojista gazeto "Železničke novine" aperigis dupaĝan riĉe ilustritan raporton pri la kongreso kun salutvortoj en Esperanto. • Inter la gastoj ĉeestis ankaŭ Slavko Bohanec, ministro por kulturo de Slovenio, Jože Jager, prezidanto de Centra komitato de trafiklaborista sindikato kaj Mirko Žlender, urbestro de Maribor, kiu okazigis akcepton por honoraj gastoj kaj landaj reprezentantoj en Fervoja ripozdomo sur Pohorje. • Koncerton prezentis Fervojista arta societo "Tine Rožanc" el Ljubljana. Tondran aplaudon rikoltis precipe junaj akordeonistoj en ĉarmaj naciaj kostumoj. • La unuan fojon oni oficiale prezentis la plej ĝisdatan atingiĝon de nia movado : jugoslavan fervojistan terminareton en Esperanto. • Vera refreŝiĝo estis ekskurso al 800-jaraĝa urbeto Ptuj. La akcepto flanke de la urbestro kaj la lokaj esperantistoj estis tre gastama. • Dum la kongreso prelegis inĝ. L. Sekereš pri modernigo de jugoslaviaj fervojoj. Pluaj interesaj prelegoj okazis pri memadministra sistemo en Jugoslavio, pri klerigado de fervojistoj kaj pri la moderna instruado en Esperanto. • Unu kongres-tago havis tre abundan kaj varian programon : plenkunsido, vizito al vinkeloj, piedpilka konkuro, opera prezentado. • La kongreskartoj validis ne nur kiel senpagaj vojaĝbiletoj tra la tuta reto de jugoslaviaj fervojoj (la 1-a klaso), sed ankaŭ kiel senpagaj biletoj por urbaj autobusoj en Maribor. • La urbestro de Maribor diris i.a. :

"Mi ŝatus vidi politikistojn el dudek landoj, kiuj povus tiel facile interkomprenigi kiel vi, esperantistoj, dum viaj kongresoj."

Rememore pri la XIII-a UK

Praha, somero 1921. La salonego de B. Smetana en la Reprezenta Domo. La 31-an de julio estis ĉi tie malfermita la XIII-a Universala Kongreso de Esperanto.

Nur nemultaj ĝisvivis la 50-jaran jubileon de unu el la plej brilaj kongresoj, kium partoprenis pli ol 2000 adeptoj de Esperanto el 35 landoj, kium honorigis per sia ĉeesto du ĉeĥoslovakaj ministroj, al kiu la Ligo de Nacioj delegis sian vicsekretario ĝeneralan kaj dek registaroj siajn reprezentantojn.

S-ino Božena Sklenčková el Praha tiel ĉi rememoras pri siaj impresoj :

"Flagoj kaj floroj ornamis la ejon lumigitan per dekoj da lustroj. Okuloj de ĉiuj ĉeestantoj brilis pro ĝojo. Eĉ homoj aĝaj ne hontis forviŝi siajn larmojn. Kaj ni ĉiuj entuziasme kantis la Esperantan himnon. La aplaŭdo ne povis trovi la finon...

La saman tagon okazis interkona vespero - en bela ĝardeno antaŭ la kongresejo /1/ sur la insulo Žofín, /hodiaŭ Slava Insulo-rim.de red./ sub densa arbaro kaj en ĉirkaŭbrako de Vultavo, kiu de du flankoj akompanis la viglan interparolon en Esperanto. Estis eminenta okazo por akiri novajn amikojn kaj mi kun mia edzo tion ple ne eluzis...

Vesperoj estis ĝenerale dediĉitaj al kulturo kaj amuzo. Ni havis plezuron aŭskulti la faman teatraĵon de J. Vrchlický "Nokto en Karlův Týn" en la traduko de Miloš Lukáš, partopreni balon aŭ ekskurson al la grotoj de Macocha en suda Moravio, kium ĝuis ĉiuj kongresanoj.

Simple kaj trafe notis pri la XIII-a UK la konata finna esperantisto V. Setälä en sia memorlibro antaŭnelonge aperinta : "Ĝi estis sukcesa kongreso."

Ankaŭ s-ro Ota Ginz dum sia vizito al Praha en julio ĉijara rememoris pri la evento antaŭ kvindek jaroj : "Mi gvidis tiam kurson de Esperanto", li diris, "kaj konatiĝis en la kongresejo kun mia estonta edzino, / fratino de s-ino B. Sklenčková - rim.dered./ kiu konsideris min hispano."

/1/ En la Reprezenta Domo okazis sole la inaŭguro.

Imitinda aktiveco


Eblecoj kiel uzi la internacian lingvon estas senlimaj. Unu el la manieroj prezentas artikolo, kium publikigis en 1955 la ĉeĥa revuo Informoj de la Societo de ĉeĥaj bibliofiloj pri O. Ginz, honora membro de EK Praha kaj pri lia nemulte konata laborkampo: liaj rilatoj kun la dana Andersen-muzeo. S-ano Ginz, tiutempe invitita de la Societo de H. Ch. Andersen al Kopenhago, suferis akcidenton kaj ne povis partopreni la feston omage al la glora fabel-verkisto :

muzeo en Odense kaj Vi riĉigis la kolekton de Andersenaj rakontoj en la ĉeĥa kaj slovakaj lingvoj. Dank'al Via afableco la ĉs.fako de la muzeo povis pruvi tiel digne la altan evoluitecon de la libro-presa arto en Ĉeĥoslovakio. Ĉeĥoslovakoj prezentis konvinkan pruvon pri la amo kaj kompreno, kun kiu ilia lando akceptis la verkon de nia fama samlandano. Ni alte taksas tiun ĉi fervoron. Kun profunda respekto Holger Andersen."

"Okaze de la 150-jara jubileo de la naskiĝo de H. Ch. Andersen estas necese menciigi la meritplenan kolekton aktivecon de O. Ginz el Praha, kium la dana societo de Andersen aprecas per esperantlingva letero sekve :

"La prezidantaro de la Societo de H. Ch. Andersen esprimas al Vi sian plej profundan dankon pro Via sensanga intereso pri la verko de Andersen. Ekde 1924 Vi estas en rilato precipe kun la

Okénko do sekretariátu



Pololetí je za námi a to je příležitost k malé bilanci. Její výsledek není příliš radostný. K 1.červenci t. r. má členství na rok 1971 zaplacenou pouze 1 824 členů, ačkoliv přihlášených je již více než 2 400 ! Stejně ne-
radostný je přehled kroužků a místních skupin. Z celkového počtu 90 kroužků má pouze 48 EK alespoň 10 platících členů. Minimální počet 5 platících členů - což je podle stanov svazu podmínkou existence EK - nemá 26 kroužků. (Jde o EK neuveřejněné v přehledu). Nenastane-li podstatné zlepšení, bude se touto situací zabývat podzimní zasedání ÚV ČES.

PŘEHLED EK podle členských příspěvků zaplacených na rok 1971 : Praha - 244, Paskov - 109, Třebíč - 95, Ostrava VŽKG - 81, Mělník - 68, Kopřivnice - 63, Brno FK0 - 50, Vsetín - 43, Třinec - 41, Č.Třebová - 39, Plzeň - 37, Č. Budějovice - 35, Olomouc - 34, Tábor - 32, Pardubice - 31, Opava - 29, Ústí n.L. - 29, Žďár n.S. - 28, Hr.Králové - 26, Jablonec n.N. - 26, Stonava - 26, Písek - 25, Poděbrady - 25, Bor - 24, Mor.Budějovice - 24, Polička - 23, Kolín - 22, Bučovice - 21, Hranice n.Mor. - 20, Ostrava-Poruba - 20, Gottwaldov - 18, Teplice - 18, Svitavy - 17, Šumperk - 17, Znojmo SZTŠ - 16, Liberec - 15, Havířov - 14, Havl. Brod - 14, Hořice - 14, Vyškov - 14, Brno I.B - 12, K.Vary - 12, Miletín - 12, Místek - 11, Most - 11, Příbram - 11, Lanškroun - 10, Ostrava ČSD - 10, Frýdlant n.O. - 9, Kladno - 9, Kyjov - 9, Přerov - 9, Městec Král. - 8, N. Jičín - 8, Český Dub - 7, Č.Lípa - 7, Ml.Boleslav - 7, Praha ČSD - 6, Žamberk - 6, Boskovice - 5, H.Počápy - 5, Jaroměř - 5, Lichnov - 5, Slavkov - 5.

PODPORUJÍCÍ ČLENOVÉ ČES v roce 1971 : F.Patera, ing.M.Hrdličková, J.Hamáčková, J.Skramuský, V.Havel, J.Leube a V.Riedl.

DARY NA EDIČNÍ FOND ČES : R.Hošek - 32.-, JUDr.J.Rathay 26.-, JUDr.M.Nývlt 12.-, Dr.ing.L.Fritsch 22.-, ing. L.Nechvátalová 17.-, M.Čížková 22.-, J.Tomášek 17.-, F.Bis 26.-, K.Fremr 12.-, L.Kafka 22.-, A.Dlugi 22.-, V. Frydrych 20.-, M.Rybin 10.-, J.Toman 28.-, B.Novák 6.- Děkujeme srdečně všem podporujícím členům i dárcům a věříme, že jejich řady se budou i nadále rozrůstat.

V MINULÉM ČÍSLE jsme uveřejnili výzvu k účasti na sportovním zápolení mezi ČES a ZESSR ve Vsetíně. Dosud jsme obdrželi pouze j e d n u (1) přihlášku ! Zřejmě mezi našimi členy nemáme zájemce o sport.

V SEZNAMU KROUŽKŮ si vyškrtněte: JUNÁK - skupina esperanto, St.Lešinger, Praha 4 - Pankrác.

SEKRETARIÁT SVAZU MÁ NA SKLADĚ dostatek esperantských publikací, gramodesek i odznaků pro vás i vaše zahraniční přátele. Máte-li zájem, napište, pošleme vám nabídkový seznam.

Horst STEINBRUCK, 47j. vendisto, 2091-Annenwalde, Krs. Templin, GDR. Interš.p.m., bk. • Viktor MEŠKOV, 32j. laboristo, dom 1, kv. 78, Taškent 131, SSSR • Jan VEDEVÍK 50j. poste restante 401 01 Göteborg 1, Svedio. Kun čeĥinoj, interš. fotojn kaj b.k. • Harumi KIDO 21 j., 19-20, Nakano, Nakanoku 5, Chome, Tokio, Japanujo • Václav VALÍČEK, 62j. emerita instruisto, Bošovice 292, okr. Vyškov, kun es-

Korespondi deziras

perantistoj el Eŭropo • Vincent POPOVIČ 51j., Správa lok. depa Letohrad, okr. Ústí n.O., serĉas kun-ulinon tutmonde • Adressaĝo : J. Řeháková, Smetanova 2709, Mělník.